

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



4

APRILLO 1959 * JARO XXVIII *

monata revuo, organiza, kultura,
socia, literatura, lingva.

Adreso: Bulgario, Sofio, bul. Dondu-
kov 57, tel. 7-46-01

Ĉefredaktoro: **Violin Oljanov**

Redakta komitato: **Ivan Sarafov,**
Stefka Hristova, Stefan Kiraĝlev,
Stefan Maserov

Abonpago: jara — 14 levoj, duon-
jara — 7, unuopa n-ro — 1,40;
por eksterlando — 16 levoj, 1,5
dolaroj aŭ egalvaloro jare.

Tarifo por reklamoj: 5 levoj por 1 cm²;
korespondanoncoj — 1 levo por
ĉiu vorto; eksterlandanaj adreso
estas presataj senpage.



KONKURSO

Okaze de la ZAMENHOFA
jaro la redakcio de «Bulgara
esperantisto» organizas kon-
kurson por plej bonaj belartaj
verkoj (versaĵoj, rakontoj, ski-
zoj, pentraĵoj k. a.) pri la aŭ-
toro de Esperanto kaj ĝia verko.
La verkoj povas esti skribitaj en
Esperanto aŭ en bulgara ling-
vo.

Templimo de la konkurso —
la fino de novembro 1959.

La statuto — fundamenta leĝo
de nia movado 1

Nia Majstro 3

Jordan Granitski. Esperantistoj
pereintaj por la libero — Niko-
la Ŝopov 4

Organiza vivo 6

Unua Maj' (kanto) 12

Ada. Lingva konsilejo — Bul-
garismoj en Esperanto 13

Ivan Sarafov. Sofia Esperanto-
societo. (Koncizaj historiaj
notoj) 14

Tra la gazetaro 15



LA REDAKCIO akceptas materia-
lojn por la koncerna numero de «Bul-
gara esperantisto» ĝis la 12-a de la
antaŭa monato. Nur kiel escepto gra-
vaj aktualaj materialoj estos akcep-
tataj ĝis la 25-a de la antaŭa monato.

La aŭtoroj estas petataj skribi tre
klare, kun granda interlinia spaco
kaj marĝeno. Manuskriptoj ne estas
resendataj.

**MAJO ESTIĜU MONATO POR AMASA VARBADO
DE ABONANTOJ AL „BULGARA ESPERANTISTO“**



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

LA STATUTO — FUNDAMENTA LEĜO DE NIA MOVADO

La 32-a kongreso de BEA akceptis novan statuton kaj la pasintjara 33-a kongreso faris ŝanĝojn kaj kompletigojn. La Centra komitato de BEA ĵus aperigis la novan kompletigitan statuton en belaspekta bulgarlingve presita broŝureto. Nun estas starigita urĝa tasko, ke ĉiu Esperanto-societo kaj ĉiu esperantisto havigu ĝin al si, detale ĝin pristudu kaj diligente agulaŭ la postuloj de ĝiaj paragrafoj, por ke ni povu rikolti riĉenhavan rezulton de nia pionireca agado por paco kaj interpopola kompreniĝo.

Bulgara esperantista asocio estas libervola demokrateca organizaĵo de bulgaraj esperantistoj, ekzistanta konforme al la § 87 de la landa konstitucio kun celoj: disvastigi la internacian lingvon Esperanto, konigi al la ekstera mondo la ekonomian prosperon kaj kulturan supreniĝon de nia laborema kaj liberama popolo, eduki la bulgaran esperantistaron en spirito de altnivela internaciismo, gvidi kaj kontroli ĉion, kio koncernas nian lingvon kaj movadon en Bulgario. Nia esperantistaro konas la fervoran klopodon de BEA por efektivigo de la supraj celoj. Tamen estas ankaŭ mankoj tiudirekte. Kvankam sporade, montriĝas samideanoj, kies agoj izolaj kaj kontraŭstatutaj difektas la stabiliĝantan aŭtoritaton de BEA. Antaŭ ne longe s-no Todor Ĵelev el Kazanlâk neglektante la ekziston de nia asocio propravole kandidatiĝis por komitatano B de UEA.

Kontraŭstatutaj estas ankaŭ la agoj de aliaj samideanoj, kiuj kunlaboras al diversaj eldonejoj pri traduko kaj redaktado de esperantaj tekstoj ne demandante la asocian estraron.

Ĉiu esperantisto devas konsideri sin respondeca pri siaj agoj antaŭ nia asocio. La izolaj kaj kontraŭstatutaj meminciatoj kiom ajn nobla estu ilia aspekto povas konduki al dissplitiĝo en la movado. La statuto estas deviga por ĉiu organizita esperantisto.

De tempo al tempo aperas multobligitaj gazetoj de esp.-societoj: en Asenovgrad, vilaĝo Borima, Ruse, Bjala, Kubrat, Kolarovgrad, Dimitrovgrad ktp. Kvankam ili ludas progresigan rolon kaj estas rezulto de kunlaboro kun la lokaj aŭtoritatoj kaj amasaj organizaĵoj estus senkompare pli bonefike, se pri similaj gravaj entreprenoj oni petus la konsenton kaj helpon de la Centra komitato. La medalo havas ankaŭ dorsan flankon. Ape-

rigo de malkonforma materialo povas grave malakceli la pluan agadon de la koncerna societo aŭ entute kompromiti la asocion mem.

Sen anticipa averto al CK kaj sen ĝia permeso la gvidantoj de la Esp.-societo en Trojan eldonis glumarkon. Iu samideano el Sviŝtov presis tekston (sur poŝtkarto), en kiu svarmas la eraroj kaj eĉ el eksterlando oni primokis lin. Sed modelo de nedisciplinita esperantisto estas la «fama» Dimitr Ivanov el Ruse. Spite al la kelkfojaj seriozaj avertoj de CK de BEA li stencilis kaj vendis sen permeso sian lernolibron. Estas ankaŭ aliaj okazoj de nedisciplineco. La societaj estraroj devas jam alpaŝi al apliko de punoj antaŭviditaj en la statuto. Nur tiel ni povos ĝustatempe atentigi aŭ eĉ forpeli el niaj vicoj la homojn, kiuj kompromitas nin.

Iufoje kelkaj societoj post interkonsento aranĝas konferencojn. La societoj povas aranĝi nur lokajn kunvenojn kaj intersocietajn renkontiĝojn. Konferencojn rajtas kunvoki nur CK de BEA.

La publika propagando, gvidata de nia asocio, estas sufiĉe granda kaj nia afero jam estas vaste konata. La Asocio de bulgaraj esperantistoj rapide kreskas kaj fariĝas grava kulturamasa organizaĵo. Nur en daŭro de la lastaj 3 jaroj BEA pligrandigis la nombron de siaj membroj pli ol 5-foje (de 400 membroj en 1955 al pli ol 2000 — en 1958). Jam venis la tempo, kiam la societaj estraroj devas strikte agadi konforme al la statuto ĉe akcepto de novaj membroj. La kandidato devas fari skriban peton, kie li (aŭ ŝi) libere devas motivigi sian deziron fariĝi membro de la societo. La estraro de la societo estas devigita trakti la peton kaj respondi al la kandidato pri la farita decido en periodo ne pli longa ol 1 monato post la ricevo de la koncerna skriba peto. En la lokoj, kie ankoraŭ ne estas fondita societo, la kandidatoj devas direkti siajn skribajn petojn pri membriĝo al la Centra komitato de BEA.

La estraro de sofia s-to «Maksim Gorkij» arbitre forstrekas el la nomaro de la membroj ĉiun samideanon, kiu pro ia kaŭzo ne pagis dum la jaro la kotizon. Pro tio la nombro de ĝia membraro ĉiujare forte ŝanceliĝas. Artikolo 8 de la statuto permesas tion nur post dufoja skriba memorigo. Tiu kondiĉo estas nepre deviga por ĉiu societa estraro.

La Centra komitato de Bulgara esperantista asocio estas profunde konvinkita, ke ni povos krei tre fortan kaj aŭtoritatan movadon, kiu finfine venigos la venkon de Esperanto en nia lando.

Al agado laŭ la nova statuto!

La redakcio de «Bulgara esperantisto» gratulas siajn abonantojn okaze de la festo de la laboro — Unua de Majo. Ni deziras multajn sukcesojn en la Esperanto-laboro. Tiu ĉi jaro estiĝu jaro de ŝturma plikresko de nia movado.

Laboru senlace por amasigo de Esperanto-societoj!

Varbu aktive novajn abonantojn al nia kara gazeto «Bulgara esperantisto»!

NIA MAJSTRO



Monumento de D-ro Zamenhof en Vieno

La 14-an de aprilo 1917 mortis la aŭtoro de Esperanto D-ro L. L. Zamenhof. Pasis 42 jaroj de tiu malĝoja dato. Nun la Esperanto-movado en nia lando kaj ankaŭ en la mondo estas en supreniro. Tiun ĉi jaron en ĉiuj landoj de la mondo estos celebrata la 100-jara datreveno de la naskiĝo de nia Majstro. Ni streĉu niajn fortojn por modela organizo de tiu glora datreveno.

NIKOLA ŜOPOV

Nikola Ŝopov naskiĝis en malriĉa laborista familio la 5-an de novembro 1912 j. en urbo Saloniko, Greklando. De tute frua aĝo li ekkonis la mizeron kaj la malsaton. Li estis atestanto de la persekutoj de la senrajtigita makedona popolo post la Balkana milito kaj li devis travivi la malfeliĉan sorton de elmigrinto.

Nikola heredis la revolucionan karakteron de sia patro kaj la mildecon kaj laboremon de sia patrino.

Pro manko de monrimedoj Ŝopov devis forlasi la lernejon kaj fariĝi laboristo en la fabriko por sukeraĵoj de Velizar Peev.

La mizero kaj la pezaj laborkondiĉoj nesentebles ruinigadis la sanon de Ŝopov kaj li malsaniĝis. Pro insistado de siaj kamaradoj li forveturis je ripozo en Berkovica.

Tie ĉi, en la malgranda monta urbeto Berkovica, Nikola Ŝopov troviĝis en medio de gelaboristoj-esperantistoj: Nikola Aleksiev, Stojan Abaĝiev, Savka Bogdanova, Simeon Petrov, Trajana Ivanova kaj aliaj komunistoj kaj aktivaj membroj de la Sendependaj laboristaj profesiaj unuiĝoj. Por la junulo Ŝopov ili ne estis ordinaraj homoj, ili scipovis nekonatan por li lingvon — Esperanto, per kiu ili interrilatis kun la tuta mondo.

Reveninte Sofion, Nikola entuziasme rakontis al sia patrino:

— Ho, panjo, ĉu vi scias kiajn homojn mi vidis! Kun kiaj gekamaradoj mi ekrilatis!

Kaj Nikola Ŝopov tuj aliĝis al unu el la kursoj de Esperanto en kultura domo «Hristo Botev», kvartalo «Juĉbunar».



Por la junulo la lernado de tiu ĉi lingvo ne estis facila laboro. Kaj al la malfacilaĵoj de la lernado supervenis la embarasoj kaj la persekutoj fare de la faŝista polico, kiu plurfoje dispelis la gekursanojn, arestis ilin, batis ilin. Sed neniam baroj povis haltigi la ardan junulon, estingi la fajreron, kiu jam brulis en lia koro. Tage Nikola laboris en la fabriko, vespere li trovis tempon ankaŭ por organiza laboro — por kunvenoj kaj konferencoj, kaj malfrue dum la nokto, reveninte hejmen, li sidis ĉe la malgranda tablo kaj diligente lernis la lingvon.

Kiel dolĉaĵa laboristo li ekdeziris interrilati kun kamarado de la sama profesio kaj li skribis al soveta laboristo en urbo Simferopol, Krimeo. Komenciĝis vigla interŝanĝado de leteroj, fotografiaĵoj, ĵurnaloj, k.t.p. Tiu

soveta laboristo el Simferopol por ĉiam restis unu el la plej ŝatataj kaj karaj amikoj de Ŝopov ekster la lando.

Ŝopov laboris pli kaj pli aktive en la klasbatala sindikata movado. Li estis elektita kiel sekretario de la Sofia dolĉajlaborista sindikato. Nikola Ŝopov sukcesis organizi kolektiv-an korespondadon inter bulgaraj kaj sovetaĵ laboristoj.

La bulgaraj laboristoj ricevis interesajn leterojn, kiujn Ŝopov donis por presigo en la ilustrita ĵurnalo «Mejdunaroden rabselkor» (Internacia laborista kaj vilaĝana korespondanto) kaj en aliaj eldonoj de la Komunista partio kaj RMS (Laborista junulara asocio). La ĝojego de Nikola pro la fruktoj de lia klopodo ne havis limojn.

Nikola Ŝopov daŭrigis sian perfektigon en Esperanto kaj interrilatis kun multaj aliaj landoj. Li korespondis ankaŭ kun unu ĉina progresema ĵurnalistino kaj kun kamarado el Jugoslavio. Li ekrilatis kun kamarado el Germanio, kiun tiutempe kaptis la bestungoj de la hitleristoj; ankaŭ kun kamaradoj el Afriko, Kanado, kaj aliloke.

Nikola Ŝopov ankoraŭ pliaktivigis sian agadon en la vicoj de Bulgara laborista Esperanto-asocio. Post la malliberigo de ĝia sekretario Nikola

Aleksiev, la juna Nikola Ŝopov lin digne anstataŭis en tiu respondeca laboro.

En 1936 j., kiam en Hispanio furiozis la intercivitana milito, Nikola regule korespondis kun hispanaj patriotoj-esperantistoj kaj legis iliajn leterojn al la laboristoj. En tiuj ĉi monatoj Ŝopov laŭ la indiko de la partio laboris aktive por sendado de internacibragadanoj en Hispanion.

La 26-an de septembro 1941 j. Nikola Ŝopov estis arestita pro la partopreno en sabotaj batalgrupoj sub la gvido de Nikola Botuŝev.

«La ĉambreto de Nikola estis proksime ĉe nia — rememoras Asen Grigorov. — Mi povis observi ĉiutage Nikolaon kaj liajn kamaradojn, kondamnitajn je morto. Faris al mi mirigan impreson la aŭdace kuraĝa konduto de Nikola».

Ĝis la lasta tago de sia vivo li kunvenigadis ĉirkaŭ si la mortkondamnitajn kamaradojn kaj instruis al ili Esperanton. Kia heroeco, kia nedetruibla kredo en la justeco, en la partio, en nia fina venko!»

La 11-an de novembro 1941 j. la supera milita tribunalo konfirmis la mortverdikton.

«Vivu libera Bulgario! Vivu nia amata laborista partio! Vivu!...» estis la lastaj vortoj de Nikola Ŝopov.

Jordan Granitski

BALOTOJ POR POPOLAJ SOVETOJ

La 5-an de aprilo 1959 en nia lando okazis balotoj por elekto de popolaj konsilantoj, juĝistoj kaj ĵurioj. Ĉe treege demokratia balotsistemo, kiu garantias plenan liberon kaj sekreton de la balotado, la balotintoj unuanime donis sian voĉon por la kandidatoj de la Patrolanda fronto, kiu unuigas komunistojn, anojn de la Agrara partio, senpartiulojn. La tuta popolo montris grandan politikan aktivecon, kiu esprimiĝis ankaŭ en tio, ke 99.83% de la balotrajtaj civitanoj partoprenis la balotojn kaj el ili 99.85 voĉdonis por la kandidatoj de la Patrolanda fronto. Tio esprimas la plenan konfidon kaj subtenon al la politiko de la komunista partio kaj de la registaro, politiko de paco, konstruado kaj antaŭeniro.

ORGANIZA*ivo*

REGIONAJ KONFERENCJOJ DE BEA DUM 1959

CK de BEA decidis organizi regionajn konferencojn dum 1959 en la jenaj urboj:

la 24-an de majo — en POPOVO,
la 31-an de majo — en vilaĝo ROZINO, Plovdiva distr.,
la 7-an de junio — en DIMITROVO,
la 14-an de junio — en MIHAJLOVGRAD,
la 21-an de junio — en PLEVEN
la 5-an de julio — en BURGAS,
la 13-an de septembro — en BLAGOEVGRAD,
la 20-an de septembro — en TOLBUHIN.
Al la societoj estos senditaj pli detalaj informoj.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ

En tiu ĉi kolono kiel ĝis nun ni publikigos la nomojn de ĉiuj samideanoj, kiuj krom la regulan jaran kotizon pagis pluse minimume 10 levojn. Ĉiu, kiu volas, ke nia Esperanto-movado rapide progresu, devas estiĝi membro-subtenanto. La societoj devas tuj pagi la kotizon al la asocia kaso, por ke la nomoj estu ĝustatempe publikigataj.

1. Ivan Stojanov — Sofio
2. Violin Oljanov — Sofio
3. Stefka Ĥristova — Sofio
4. Ivan Sarafov — Sofio.

IDEALISMA AGADO

La Sofia societo «M. Gorkij» sciigis al ni, ke ĝia ano Asen Grigorov, membro de la estraro de CK de BEA, malgraŭ sia troa okupateco kiel redaktoro de «Nuntempa Bulgario» kaj Vicperzidanto de «Bulgara Esperanto-instituto» kolektis la membrokotizojn de pli ol 90 membroj.

Dankon kaj gratulon al tiu abnegacia samideano. Se ĉiu societo havas po 2-3 tiajn aktivulojn, nia movado ekfloros.

Kiu postsekvos la ekzemplon de s-no Grigorov?

Ĉiu Esperanto-aktivulo devas posedi kaj koni

LA STATUTON

de la Bulgara Esperanto-asocio, kiu ĵus aperis.

Prezo 0.50 lv.

Serĉu ĝin ĉe la lokaj societoj. Mendu al la asocio: p. k. 66, Sofio.

LA ENLANDA MOVADO VIGLAS

Pleven. Antaŭ dek monatoj en nia historia urbo estis restarigita la iama esperantista societo. Ĝi komencis sian novan vivon kun 54 membroj kaj nun ĝi nombras 82 membrojn.

En la ĝenerala jarkunveno, okazinta je la 11-a de januaro k.j. estis elektita nova estraro: prez. — Ljuben Dunčev, sekretario — Ivan D. Daskalov, kasisto — Vasilka Jatanska, kaj membroj: Zdravko Velinov, Venecij Velinov, Aleksandr Marinov, Margarit Serafimov, Venceslav Dimitrov kaj Evlogi Evlogiev. Kontrola komitato: Bačo Šopov, Georgi Cvetaŭnov kaj Menahem Melamed.

En la fino de la pasinta jaro ni

malfermis du kursojn. En la unua — populara kurso — kun gvidanto nia esp. veterano Ivan Daskalov, partoprenas 34 gekursanoj (laboristoj, arkitektoj, oficiroj, financistoj, eksinstruistoj, pensiuloj kaj studentoj de la pedagogia instituto). En la dua kurso (en maŝinkonstrua lernejo, gvidata de k-do Pârvan Petkov) partoprenas 16 lernantoj.

Ĉe la societo estas fondita ankaŭ junulara esp. grupo, gvidata de k-do Venecij Velinov.

Unuvorte, nia societo esperige kreskas, sukcese laboras kaj obstine agadas.

I. N. D.



Esperanto-kurso en Pleven, gvidata de la sperta lektoro Ivan Daskalov

Asenovgrad. Je la 21-a de februaro 1959 nian societeton vizitis d-ro Todorov. Pli ol horon li rakontis al la ĉeestantoj siajn impresojn pri sia veturado de Bulgario tra Sovetunio kaj Ĉinio al Vietnamio.

Kun granda atento kaj plezuro oni aŭskultis lin. Unue li rakontis pri moskvaj gesamideanoj, pri la Esperanto-grupo «Fajrero» kaj tieaj favoraj cirkonstancoj por Esperanto, pri la beleco de Moskvo. Entuziasme li rakontis pri popola Ĉinio. Pri iliaj atingajoj en la socialisma konstruado, pri la ĉina bonkoreco kaj pri la Esperanto-movado en iuj urboj, en kiuj li restis kelkajn tagojn. Neforgebla restos por mi, li diris, dum mia tuta vivo la pasigita en Vietnamio unu jaro inter ĉarmaj Esperanto-pioniroj, pachtalantoj kaj ŝtatgvidantoj, kiuj tre favore rilatas al nia kara Esperanto. Li sciigis la ĉeestantaron, ke tie li uzis preskaŭ nur Esperanton, ke en Esperanto li prelegis pri medicino kaj konvinkiĝis ankoraŭfoje, ke Esperanto estas multfoje pli taŭga ol kiu ajn nacia lingvo.

La vietnamiaj gesamideanoj ŝatas la bulgarajn esperantistojn kaj nian landon. Ili treege deziras, ke ni kreu inter ni pli proksimajn ligojn. Ni korespondu amase kun ili kaj helpu ilin en ilia estonta poresperanta kaj porpaca agado. Liaj vortoj estis postsekvitaj per laŭta manaplaŭdo.

Pro vekita intereso al s-ano Todorov estis starigitaj multaj demandoj, al kiuj li respondis afable kaj kontentige. Fine la prezidanto de la kunveno tralegis leteralvokon de la vietnamia pacmovada esperantista asocio pri la kruelaĵoj fare de la prosona sudvietnamia registaro, kiu antaŭ nelonge venenigis ĉirkaŭ 1000 politikajn malliberulojn. La kunveno voĉdonis protestan leteron al la sudvietnamia registaro, ke ĝi haltigu la bestecajn, sangavidajn kruelaĵojn.

Post la fino de la kunveno la ĉeestantoj pere de la prezidanto esprimis sian koran dankon al s-no Todorov pri lia belega prelego kaj petas CK-on, ke estonte similaj prelegoj estu aranĝotaj pli ofte.

At. Gaev

Vilaĝo Batak, distrikto de Peŝtera

Gravan intereson elmontris la membroj de nia Komsomolo al Esperanto. Ili malfermis kurson kun 40 partoprenantoj (gejunuloj, civitanoj kaj lernantoj). Antaŭ la malfermo de la kurso ni aranĝis du propagandajn vitrinojn kaj du lokajn radiodisaŭdigojn pri Esperanto.

La kurso ekfunkciis je la 1-a de novembro 1958. Antaŭ kelkaj tagoj la gekursanoj travivis gravajn momentojn en sia agado — ili forsendis la unuajn leterojn al siaj eksterlandaj gesamideanoj. En siaj leteroj la kursanoj rakontas pri nia socialisma konstruado, pri la plenumo de kvinjara ekonomia plano en reduktitaj templimoj, pri batalado de nia popolo por paco kaj amikeco inter la popoloj.

Estas jam ricevitaj la unuaj leteroj el eksterlando.

La intereso al Esperanto plialtiĝas kaj estas malfermota nova kurso por komencantoj.

V. Gazinĉev

Stanke Dimitrov. La 29-an de januaro 1959 k-doj B. Drenski kaj I. Dobrovski vizitis la vilaĝon Sapareva banja. Antaŭ la gelernantoj de la gimnazio oni prelegis je temo: «Kio estas Esperanto kaj ĝia rolo por la internaciaj rilatoj». La prelegojn oni aŭskultis kun granda atento kaj intereso. Oni faris multe da demandoj. Poste oni aŭdis la versaĵojn «La vojo» kaj «Lasta rozo», deklamitaj de k-do Dobrovski. Estis organizita malgranda ekspozicio. La geïnstruistoj

kaj la gelernantoj restis tre kontentaj kaj ekdeziris lerni la lingvon. Ni klopodas solvi la taskon — serĉi kaj trovi kursgvidanton.

Dobrovski

Pazarĝik. Je la 22 de februaro okazis la jara kunveno de societo «Radio», kiun ĉeestis ankaŭ reprezentanto de CK de BEA — Canko Murgin. Pro la foresto de kelkaj niaj anoĵ kaj la grava gripa malsano de aliaj la kunvenon partoprenis 70% de la societanoj.

Unuafoje ni havis la plezuron aŭskulti bonegan belartan programon, plenumitan de gelernanta grupo gvidata de P. Arnaudov.

La sekretario de la s-to P. Arnaudov raportis pri la agado de la societo.

La ligoj kun CK de BEA ne estis regulaj ne pro nia kulpo. Ni estis en ligo kun la societoj en Varna, Plovdiv, Sofia, Kubrat, Velingrad kaj kun la esperantistoj en Moskvo, Leningrad, Pollando, Ĉeĥoslovakio, G.D.R., Aŭstrio, Francio, Italio, Svislando, Jugoslavio, Greklando, USA k.t.p. Dum la jaro estis 4 kursoj por komencantoj kaj 1 por progresintoj. Esperanto-radiodisaŭdigoj estis 9 krom la regulaj ne menciitaj sciigoj.

La societo ricevadis 8 Esperanto-revuojn. Estis liverata literaturo kaj lernolibroj je pli ol 1400 lv.

La societa vivo estis respegulita pere de 8 resumaj artikoloj, en diversaj Esperanto-revuoj kaj ankaŭ pere de 11 artikoloj kaj anoncoj en bulgaraj kaj du sovetaĵ ĵurnaloj.

Post la diskutoj estis aprobitaj salutleteroj al CK de BKP, Ministerio de la klerigo kaj kulturo, CK de Kom-somolo, redakcio «Literaturen front», «Septemvrijsko zname» kaj al urba radio-centro.

La nove elektita estraro konsistas el: prezidanto — Ivan K. Vasilev,



La jarkunveno de s-to «Radio»

vicperzidanto — Nikola Iv. Cărcarov, sekretario — Petko Arnaudov, kasisto — Najden Iv. Angelov, bibliotekistino — Rosica Georgieva. Elektita estis kontrolo komisiono kaj konstanta korespondanto — K. Genĉev.

Konstantin Genĉev

Stanke Dimitrov. La 26-an de februaro 1959 okazis la jarkunveno de nia societo «Marek», kiu akceptis la raporton de la estraro kaj planis la estontan laboron. En la diskutoj partoprenis multaj samideanoj, kiuj faris bonajn rekomendojn. En la estraro estis elektitaj: B. Drenski, B. Mihajlov, P. Ganiŝev, Stoimen Koŝutarski, Izak Taĝer, Sneĵana Pargova, Krum Veliĉkov; en la Kontrolo komisiono: Hristo Lazarov, Stoil Kolarov, Liljana Smokova; en la redakta komitato: Ivan Dobrovski, Straŝimir Krâstev, Kiril Tomov.

Dobrovski

Vidin. Kun granda intereso mi legis la unuan numeron de «Bulgara esperantisto» kaj intencas utiligi ĝiajn novaĵojn por la loka radiodisaŭdiga centro. Tion ni faros regule ĉiumonate.

G. Simeonov

Târnovo. La 24-an de februaro 1959 j. Esp.-societo «Lumo» okazigis sian jarkunvenon.

La raporto de la estraro enhavis riĉajn atingaĵojn. Dum 1958 estis malfermitaj 4 kursoj en la mezaj lernejoj surbaze de oficialaj studrondetoj kaj la kursgvidantoj estas pagitaj de la lernejoj.

Estis malfermita kurso por civitanoj, vizitata de 25 gekursanoj. Ĉiuj kursoj estas sukcesplenaj. Estas prelegitaj kvar raportoj, aranĝitaj estis distrikta renkontiĝo, Zamenhofa vespero k.t.p. La estraro laboris laŭ plano.

Dum la jaro kuranta oni laboras ankaŭ laŭplane. Elektitaj estas komisionoj: organiza, propaganda, junulara, kursa. Okazigotaj estas komunaj ekskursoj, renkontiĝoj, amuzvesperoj k.t.p. La kursoj estas plifirmigitaj kaj plinombrigitaj.

La jarkunveno decidis dum tiu ĉi jaro plimultigi la membraron je 80 kaj fondi novajn societojn ĉe stacio Gorna-Orjahovica kaj en urbo Ljaskovec.

Oni interkonsentis kun la loka ĵurnalo «Borba» por presigi pli ofte Esp.-materialojn. Ankaŭ la loka radioreto en la urbo disaŭdigas pli ofte propagandmaterialojn.

N. Najdenov

Levskigrad. La 15-an de marto 1959 okazis la jarkunveno de nia societo. La klubo de Bulgara komunista partio, en kiu okazis la kunveno, estis bone ornamita. Sur la muro estis metita slogano: «Per Esperanto por mondpaco». Ĥoro de lernejo «V. Kolarov» plenumis kantojn — esperantan, bulgaran kaj rusan. La raporton tralegis la sekretario Cvetan Cvetkov. Oni elektis novan estraron. Unanime estis akceptita la rezolucio, kiu estos por ni programo en nia estonta agado.

L. Gajdarov

Govedarci, distrikto de Samokov. La 16-an de novembro 1958 ni malfermis kurson sub la gvidado de Argir Andonov Popov. La saman tagon ni fondis societon «Mondpaco». La 18-an de marto j. k. la kurso finis sian laboron. Multaj el la gekursanoj komencis korespondadon kun fremdlandanoj. Ili fariĝis bonaj propagandantoj de la lingvo kaj batalantoj por paco.

S-no Argir Andonov forveturis al sia naskurbo Poljanovgrad kaj ni esperas, ke li ne forgesos nin. Lia restado en nia vilaĝo donis favorajn rezultojn por la movado.

Nun ni preparas nin por la jara kunveno. La estraro de la societo decidis planti la lokon «Prekrite reki» situantan sur la vojo al la turista domo «Maljovica» kaj multe vizitatan de niaj kaj fremdlandaj turistoj. La lokon ni nomis «Esperanto». Post tri jaroj ni transdonos ĝin al la loka forsta administracio.

Samokov. La 10-an de marto 1959 okazis la jarkunveno de Esp.-societo «Rila esperantisto». Estis elektita nova estraro: prezidanto Trifonov, sekretario P. Buĉevinov, kulturkleriganto — Tod. Kjulanova, kasisisto — Nik. Moskovski; kontrolo komitato: Boris Bosev, Slavka Daskalova, Nikola Karaĝinov.

Sozopol. Okaze de la Unua de majo la loka esperantista societo kaj la komitato por defendo de la paco aranĝas je la 26-a de aprilo 1959 j. letervesperon.

Bonvolu sendi bele afrankitajn il. kartojn, leterojn, presajojn. ktp. Viaj gratuloj helpas nin en nia laboro por Esperanto kaj en la batalo por defendo de la paco. Ni nepre respondos. Adreso: Esperantista societo «Apolonia» — Sozopol, Bulgario.

Ruse. La 15-an de marto 1959 okazis la jara kunveno de nia societo. La Esp. klubejo estis plenplena. Dum la jaro funkciis 6 Esp. kursoj kun pli ol 200 partoprenintoj. Pli ol 60 junuloj fondis junularan Esp.-grupon. Estis fondita ankaŭ junulara Esp. amatora kolektivo «Juneco». La esperantistoj, precipe la junuloj, korespondas kun multaj samideanoj el diversaj landoj de la mondo. Ili rakontas al siaj amikoj pri la sukcesoj de nia lando. Nian urbon vizitis esperantistoj el Francio, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Rumanio. Por nia agado kaj precipe por la agado de la junuloj skribis la soveta ĵurnalo «Lesnik Severa» en urbo Arĥangelsk. Dum la somero ni organizos junularan esperantistan laborbrigadon, kiu laboros sur unu el la urbaj objektoj. Pri ilia laboro ni sendos apartan informon. Ni faris proponon al la urba konsilantaro doni nomon «D-ro L. L. Zamenhof» al la strato «Carigrad» kaj la nomon «Esperanto» al unu placo, kiu troviĝas proksime al strato «Carigrad».

Jord. Dimitrov Kalinov

Kazanlak. Dudek sep gekursanoj-komencantoj, kiuj lernas la internacian lingvon Esperanto en urbo Kazanlâk kun kursgvidanto Gavrîl Nestorov, sendas jenan alvokon al ĉiuj partoprenantoj en la kursoj por lernado de la lingvo internacia Esperanto kiel komencantoj en Popola respubliko Bulgario.

Ni turnas nin al ĉiuj komencantoj, kiuj lernas la lingvon Esperanto, kaj invitas ilin al obstina ĉiutaga laboro, al batalo por ricevo de distinga titolo «Kurso — nacia unuarangulo».

Ni devigas nin:

1. Ĉiam plenumi modele la klasajn kaj la hejmajn ekzercojn en siaj kafejoj.

2. Neniam foresti de kursaj okupoj

pro sensignifaj kaŭzoj, kaj kiam ni devas foresti pro gravaj kaŭzoj, la jam lernitan lecionon kaj la hejmajn ekzercojn ni preparu memstare aŭ kun la helpo de niaj kamaradoj aŭ de la instruanto.

3. Klopodi maksimume por la plena kaj kvalita ekposedo de la materialo kaj por la sukcesa finiĝo de la kurso.

4. Tralegi memstare aŭ kun la helpo de la vortaro almenaŭ unu belartan verkon en Esperanto kun minimumo de 50-60 paĝoj, farante eltiraĵojn aŭ resumon de la enhavo.

5. Uzi konvenan Esperantan literaturon en sia ĉiutaga laboro.

6. Komenci korespondadon en Esperanto kun esperantistoj de la tuta mondo ne pli malfacile ol post la ellerno de la 10-a leciono.

7. Interparoli kun niaj kamaradoj kaj kun aliaj esperantistoj nur en Esperanto.

8. Aboni al la organo de Bulgara Esp. asocio — «Bulgara esperantisto».

9. Fariĝi membroj de la Esp.-societo «Roza valo» en Kazanlâk kaj partopreni plej vigle en ĝia vivo.

10. Labori ofere por la disvastigo de Esperanto inter la loĝantaro.

La Pola radio decidis enkonduki en siajn programojn por eksterlando ĉiutagajn duonhorajn dissendojn en la internacia lingvo Esperanto. La dissendoj pritraktos aktualajn informojn el Pollando kaj el eksterlando kaj sciigojn pri la Esperanto-movado enlanda kaj tutmonda. Ili okazos je la 16.30 h. per ondoj: 25.39, 30.98, 31, 31.45, 31.50, 41.12 m. kaj per mezlongaj ondoj (249 m.). Per la decido Radio-Varsovio aldoniĝas al dudekda radio-stacioj, kiuj regule dissendas en la internacia lingvo.

Unua Maj'

Teksto: Cvetan Angelov

Muziko: Ilija Temkov

Vigle

mf Flir- tu, ruĝ- stan- dar- doj, ĉe la hej- ma spac'!

Bun- ta, hel- ri- gar- da on- dashom- a- mas, on- dashoma-

Refreno

mas'. Kun maj- est' kaj bru- a gaj' lu- mas fest' — U-

nu- a Maj'! Kun maj- est' kaj bru- a gaj'

lu- mas fest' — U- nu- a Maj'!

Flirtu, ruĝstandardoj,
ĉe la hejma spac'!
Bunta, helrigarda
ondas homamas'.

Refreno:
Kun majest'
kaj brua gaj'
lumas fest' —
Unua Maj'!

La popol' labora
marŝas al prosper'!
Ŝprucas kant' sonora;
plena de esper'!

Refreno:
Kun majest'
kaj brua gaj'
lumas fest' —
Unua Maj'!

Flugu, kant' komuna,
ĉe l' libera land'!
Streĉu forton junan,
proletar' — gigant'!

Refreno:
Kun majest'
kaj brua gaj'
lumas fest' —
Unua Maj'!

BULGARISMOJ EN ESPERANTO

1. **I vâlkât sit i agneto cjalo** — kaj la lupo sata, kaj la ŝafido nedifektita = ambaŭ flankoj (estas) kontentigitaj (sen domaĝo por kiu ajn el ili).

2. **Ot djado Adamovo vreme** — el la tempo de avo Adamo = el tre antikva nememorebla tempo.

3. **Gledaj mu akâla, pa mu kroi kapa** — vidu lian intelekton kaj (laŭ tio) tajlu ĉapon por li = li ne meritas seriozan traktadon (atenton, konsideron).

4. **Merja sâs svoj arŝin** — mezuri per propra metro = konsideri la aferojn subjektive, laŭ persona plaĉo aŭ intereso.

5. **Edno baba znae edno si bae** — unu (aferon) avino scias, ĝin ŝi parolas = obstine kaj insiste prezenti sian tezon, ne konsiderante la kontraŭargumentojn.

6. **Mnogo babi — hilavo dete** — multaj akuŝistinoj — kripla naskito = se multaj aranĝas kaj komandas, riceviĝas fuŝaĵo (fuŝrezulto).

7. **Ot djado i baba** — de avo kaj avino = el malnova tempo.

8. **Taka i baba znae** — tiel (tiamaniere) eĉ avino povas = ĉiuj povas fari tion (ĝi ne estas malfacila).

9. **Traj babo za hubost** — toleru avino, por akiri belecon = vane atendi ion bonan.

10. **Babini devetini** — naŭtaga panikido (post la taĝo de la morto) de avino = sensencaj paroloj, stultaĵoj.

11. **Barabar Petko s mâjete** — Petko kune kun ĉiuj viroj = pri persono, kiu miksiĝas en medio, por kiu li ne konvenas.

12. **Na barut miriŝe** — odoras pulvon = estas antaŭsignaloj, indikoj pri eksplodo de milito.

13. **Jazâk za baruta** — domaĝo por la (uzita) pulvo = pri vanaj kaj senrezultaj fortostreĉoj.

14. **Bas dârja** — teni veton = veti.

15. **Iska baŝta si i majka si** — postuli siajn gepatrojn = proponi (ĉe vendo) ion je ekscesa prezo, postuli ekscesan prezon pri io.

16. **Ti baŝta, ti majka** — vi (estas mia) patro, vi patrino = nur de vi mi atendas helpon kaj apogon.

17. **Baja si pod nosa** — murmuri sorĉaĵojn sub la nazo = murmureti, grumbleti (neturnante sin rekte al la kunparolanto).

18. **Beĵanova majka ne plaĉe** — la patrino de Beĵan (Fuĝinto) ne ploras funebre = kiu forfuĝis, ne pereas.

19. **Vkarvam v belja** — enirigi, enpuŝi en malbonan okazon = esti kaŭzo por malagrablaĵo, kiu trafis iun.

20. **Târsja si beljata** — serĉi por si malfeliĉon, malbonŝancan okazon = per sia senkonscia konduto li venigos al si malagrablaĵon.

21. **Bera duŝa** — kolekti sian animon = agonii.

(Daŭrigotaj)

ADA

SOFIA ESPERANTO-SOCIETO

(Koncizaj historiaj notoj)

La unua broŝuro de d-ro L. Zamenhof pri la lingvo internacia aperis dum julio 1887 j. La unua bulgara broŝuro, verkita laŭ la rusa originalo de Miloslav S. Bogdanov, aperis en Sofio en 1889 j. En la sama jaro aperis en Sofio la unua gazeto «Mondlingvisto», redaktita kaj eldonita de la sama Miloslav S. Bogdanov. De ĝi aperis nur 2-3 numeroj.

La germanoj fondis la unuan Esperanto-societon (1888), la rusoj — la duan (1889), la bulgaroj — la trian — en Sofio (1889), «Societo de la amikoj de la monda lingvo», fondita de Miloslav S. Bogdanov. La societo vivis tre mallonge.

En 1904 j. en Sofio oni fondis Esperanto-societon «Aŭroro», kies gvidantoj estis Nikola Kovačev, Petro Popov, Georgi Aktarĝiev. Ankaŭ ĝi ne vivis longe.

En 1905 j. grupeto da studentoj (Sim. N. Petkov, Hr. Rjahovski, Georgi P. Genov, Petro Spasov, Georgi P. Zografski, Georgi Karastojanov, Georgi Nikolov) en Sofio fondis literaturan rondeton, kiu komencis eldoni propagandcele litografian gazeton «Pârva kračka». En 1906 j. la gazeto aperis nur en Esperanto, litografie, sub la nomo «Unua paŝo».

La 7-an de oktobro 1906 j. la sama literatura rondeto kunvokis en Sofio bulgaran Esperanto-kongreson. Tiam oni fondis «Bulgaran societon por propagando de «Esperanto» kun organo «Bulgara esperantisto», redaktita en Sofio, presita en Pleven. De ĝi aperis 3 numeroj. La societo ne povis eklabori.

En 1909 j. en Sofio oni fondis Esperanto-societon, kiu ekzistas ĝis nun.

En 1910 j. en Sofio okazis la IV kongreso de la Bulgara Esperantoligo. La kongreso elektis kiel prezidanton de la Ligo Georgi Aktarĝiev el Sofio. Tiam Sofio fariĝis centro de la movado kaj kiel gvidantojn de la movado oni elektis membrojn de la sofia Esperanto-societo. Antaŭ tio la centro de la movado unue estis en Tarnovo (1907 j.) kaj poste en Kolarovgrad (1908-1909 j.).

En 1911 j. la sofia Esperanto-societo kunvokis kunvenon en Sofio, kiu akceptis novan statuton, ŝanĝis la nomon de la «Ligo» je «Societo» kaj la lokaj grupoj fariĝis «sekcioj».

En 1912 j. la Bulgara Esperanto-societo kunvokis en Sofio sian unuan jarkunvenon (la V-an kongreson de la bulgaraj esperantistoj), kiu elektis kiel prezidanton Simeon N. Petkov el Sofio.

Dum la militaj jaroj (1913-1918) la societo preskaŭ ne vivis.

Post la milito, en 1919 j. oni denove komencis viglan agadon. «Bulgara esperantisto» komencis aperi regule. Oni denove elektis kiel prezidanton Georgi Aktarĝiev. En 1921 j. en kelkaj gimnazioj de Sofio (kaj en aliaj urboj de la lando) estis oficigitaj oficialaj lektoroj de Esperanto.

En 1921 j. oni fondis en Sofio komunistan Esperanto-grupon «Balkana liberiga stelo» (iniciatintoj Panajot A. Kolev, Stefan Nenkov, Angel Nikolov, Maleŝko Ŝiŝkov k. a.), kiu ekzistis ĝis 1923 j. kaj ĝiaj membroj estis ankaŭ membroj de la sofia Esp.-societo.

En 1928 j. en Sofio oni fondis memstaran laboristan Esperanto-societon.

Pro internaj bataloj en 1929 j. oni ne povis elekti Centran komitaton de la Asocio el la sofiaj esperantis-

toj kaj pro tio oni translokigis la asocian gvidadon en Ruse. Tio daŭris du jarojn (1929-1930).

De 1930 j. Sofio denove fariĝis centro de la movado kaj estas tia ĝis nun.

En 1930 j. en Sofio oni fondis Laboristan Esperanto-asocion, kiu eldonis organojn «Balkana laboristo», «Internacia lingvo», «Internacia rabsekor». En 1934 j. oni malpermesis la ekzistadon de la «Lab. Esp. asocio» kaj ĝiaj membroj eklaboris en Bulg. Esp. asocio. Tio donis fortan antaŭenpuŝon al la movado. En 1939 j. laŭ sugesto de la faŝista polico oni forigis de la sofia societo 20 progresemajn kaj aktivajn samideanojn.

La dummilitaj jaroj (1941-1944) ĉesigis la esperantan agadon. Multaj esperantistoj fariĝis partizanoj, multaj el ili pereis por la libero. La lasta duobla numero de «Bulgara esperantisto» aperis dum junio 1942 j. Tiutempe la societo ĉesis sian agadon.

Denove la movado ekfloris post la 9-a de septembro 1944 j. En la komenco de oktobro 1944 j. la sofiaj esperantistoj elektis provizoran komitaton kiu gvidis la landan movadon ĝis 25. VIII. 1945 j. La 28-a bulgara kongreso elektis kiel prezidan-

ton de la Asocio prof. d-ro Stojan Ĝuĝev el Sofio, kiu restis tia ĝis 1956 j.

De 1949 j. ĝis 1955 j. ekestis stagna periodo. Denove la movado ekvigliĝis en Sofio dum 1955 j. La sofiaj esperantistoj kunvokis en Sofio la 32-an bulgaran Esperanto-kongreson, kiu elektis kiel prezidanton Georgi Dolapĉiev, membro de la Sofia fervojista societo. (Nun en Sofio estas ankaŭ societoj de la fervojistoj-esperantistoj, de la poŝtistoj-esperantistoj, de la blinduloj-esperantistoj.)

En 1957 j. en Sofio oni fondis Bulgaran Esperanto-instituton, (prezidanto — prof. d-ro Stojan Ĝuĝev) kun sekcioj: vortara, gramatika, literatura, historia, pedagogia, bibliografia. Ĉiuj sekcioj estas membroj de la Sofia Esperanto-societo.

Nun la societo vigle laboras por la triumfo de la lingvo. La societo donas aktivulojn por diversflanka laboro («Nuntempa Bulgario», «Junularo de Bulgario», «Bulgara filmo», disaŭdigoj de Radio Sofio k. a.). Ni povas esperi, ke dum la Zamenhofa jubilea jaro la agado de la societo ankoraŭ plivastiĝos kaj donos bonajn rezultojn.

Ivan Sarafov

KORESPONDU KUN SOVETIAJ GESAMIDEANOJ

USSR. En siberia urbo Barnaul (Altaja regiono) estas fonditaj tri esperanto-lernogrupoj, kiuj vigle laboras. La grupoj estas unuaj postmilitaj en la urbo.

Multaj barnaulaj novaj geesperan-

tistoj deziras korespondi pri diversaj temoj, interŝanĝi librojn, ĵurnalojn, gazetojn, p.k., p.m., k. a. Skribu al adreso: Azarij Perelman, str. 21 janvarja, N-o 17-v, kv. 3, urbo **Barnaul 15, USSR.**

TRA LA GAZETARO

En multaj urboj kaj vilaĝoj de nia lando aperas diversaj gazetoj kaj ĵurnaloj — ĉu ĉiutagaj, ĉu semajnaj aŭ monataj. En ili oni publikigas de tempo al tempo ankaŭ artikolojn, informojn, kroniksciigojn kaj aliajn materialojn pri nia lingvo aŭ pri nia movado. Multfoje ni petis la samideanojn esti afablaj kaj sendi al ni aŭ la gazetojn mem aŭ eltranĉaĵojn de ili kun indiko pri la gazeto kaj ĝia dato. Iuj el la societoj plenumas regule la taskon, sed multaj ignoras ĝin, ne konsideras ĝin grava. Denove nun ni substrekas la gravecon de la tasko.

En tiu-ĉi rubriko ni komencas publikigi sciigojn pri la ĵurnaloj, en kiuj aperas pri-esperantaj artikoloj kun diversaj aldonoj, kritiknotoj, k. a.

En ĵurnalo «Ĉernomorski Front» (18.XII. 1958), organo de la distrikta komitato de Bulgara komunista partio, de la distrikta komitato de la Patrolanda fronto en urbo Burgas, aperis artikolo kun titolo: En Burgas estas malfermita ekspozicio «Esperanto-UNESKO». La ekspozicio estis aranĝita de la esperantista societo «Nigra maro» en Burgas. Ĝi havis grandan sukceson.

En ĵurnalo «Ludogorska pravda» (4.IV. 1959), organo de distrikta komitato de Bulg. komunista partio, de la Popola konsilantaro kaj de la distrikta komitato de la Patrolanda fronto en urbo Razgrad, aperis longa artikolo kun titolo «Letero de sveda esperantisto al la esperantistoj en urbo Kubrat». La letero de la sveda samideano estas treege interesa kaj ni gratulas la esperantistojn en Kubrat pri ĝia traduko kaj publikigo. Kubrat vere fariĝis esperantista fortikaĵo en Nordorienta Bulgario kaj ni bondeziras al ili novajn sukcesojn en la batalo por paco kaj por la plenumo de la kongresaj decidoj. Sed en la artikolo estas allasitaj du gravaj eraroj: 1. Botev ne vivis en la fino de la 18-a jarcento, sed de la 19-a. 2. Revuo «Nuntempa historio» ne aperas, sed aperas «Nuntempa Bulgario». Do, ni estu pli atentaj kaj pli postulemaj!

Iv. Sarafov

EN JULIO 1959 EN RIO DE JANEIRO, ĈEFURBO DE BRAZILIO, estas aranĝota grandioza ekspozicio de Esperanto. La esperantistoj ĉiulandaj estas petataj sendi al la direktorino de la Ekspozicio — F-ino Jolanda Costa, Praca da Republica, 54, 1, Rio de Janeiro, Brazilo, jenajn materialojn:

1. Ĉiu estrarano, individue (nur de la landaj asocioj) sendu afablesian foton, tiel grandan kiel bildkarton, almenaŭ prunte.

2. Ĉiu delegito ordinara aŭ faka, sendu afable la plej belan bildkarton, preferinde en koverto, por ne ĝin difekti.

3. Ĉiu esperantisto helpu laŭ sia ebleco kaj bonvolu sendi bonajn, novajn publikigaĵojn en Esperanto, prospektojn, reklamojn, flugfoliojn, bultenojn, informilojn, afiŝojn, glumarkojn, esp. poŝtmarkojn — unuvorte, ĉion, kio utilos por plej bone impresi la vizitantojn kaj pravi la sukceson de Esperanto.

La petitan materialon ni akurate resendas, se ĝi venos nur prunte.

MEDICINA LITERATURO EN INTERNACIA LINGVO

La ĵus aperinta bibliografio de la medicina literaturo en Esperanto, eldonita en Tokio, citas 147 medicinajn eseojn originale verkitajn en la Internacia lingvo, 841 resumojn kaj 22 teknikajn vortarojn. La pritraktitaj temoj koncernas 22 medicinajn fakojn.

**Helpu al la redakcio plibonigi la gazeton
per amasa abonigado**

DEZIRAS KORESPONDI:

BULGARIO, Burgas, str. Antim I, No. 18, Nikola V. Kirjazov.

BULGARIO, Pazarĝiŝko, Batak, Angel St. Kanev (Dudek gekursanoj deziras korespondi).

BULGARIO, Botevgrad, str. Preslav 18, — Mitrofan Veleŭ.

BULGARIO, Sofia, str. Asen Zlatarov 19, — Neofit Spasov.

BULGARIO, Tarnovo, str. Janaki Donĉev 13, — Marin P. Kalomenski, je ĉiuj temoj.

GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO, Zittau 2, Post Hartau, Oberlauzitz — Hartauerstr. 15, Bez. Dresden-Sachsen — Karl Jos. Th. Bannert.

POLLANDO, Varsovio 12, ul. Humanska 8a m. 3. — Maria Straŝevska (16-jara lernantino).

ĈEĤOSLOVAKIO, Viŝkov 2, Moravkova 236, Zabludil Alois.

USSR, g. Gorkij 7, p. jaŝĉ. 110, Doma Rabotnikov Prosveŝĉenia — Sekcija Esperanto — kun bulgaraj gesamideanoj.

USSR, Litovio, Moletai, Vilnius 26, — Margarite Vlasova (instruistino).

ĈEĤOSLOVAKIO, Hulin, Komniského 852, — Kamenik Josef (vizitos dum la somero Varna).

USSR, Latvio, — Riga, Unijas str. 83-8, Kaslis Djintars, per p.k.

USSR, Perm-6, Kujbiŝeva 32-1, Svetlakov Boris, kun studentoj de medicino.

EN LA VIETNAMA ĴURNALO DOC LAP (1958 j.) aperis tradukita el Esperanto «Fabelo pri la ŝtuparo» de Hristo Smirnenski kun mallonga biografio noto kaj portreto de Smirnenski.

PRI TRIFON N. HRISTOVSKI

La 17-an de majo 1944 mortis la bone konata progresema esperantisto kaj batalanto por nova vivo Trifon N. Hristovski el vilaĝo Radotina, regiono de Botevgrad. Aŭtodidakte li ellernis la lingvon internacian kaj per Esperanto li sukcesis krei ligojn kun la laboruloj el la tuta mondo kaj kiel batalanto-verkisto fari multon por la konatigo de nia popolo kaj ĝiaj bataloj kontraŭ la ekspluatado. Multnombraj estas liaj amikoj-esperantistoj en la tuta mondo. Pri iuj el ili mi posedas materialojn. Mi havas ideon elserĉi la presitajn materialojn pri Hristovski en la progresiva gazetaro de la mondo, por ke ni eldonu duan parton de «Mia vivo» (La vivo de Hristovski — eldono de Profizdat — en Sofia) — «Vivo por ekzemplo».

Estas petataj la samideanoj en la mondo, kiuj posedas iajn materialojn pri Hristovski aŭ scias ion pri li, skribi al kapitano Vasil Vasilev — Arme-prokuroro — Sofia.

DUM DECEMBRO 1959 EN BANGKONG, INDONEZIO, okazos la unua kongreso de Indonezia Esperanto-asocio.

Oni invitas la esperantistojn el la tuta mondo viziti la kongreson, en kiu estos gravaj prelegoj pri la Esperanto-movado, gajaj orientaj art-vesperoj kaj ekskursoj al belaj lokoj en Indonezio, kiu havas la plej belan naturon en la mondo. Per tio la esperantistoj montros, ke Okcidento kaj Oriento povas unuiĝi per Esperanto. Ni volas pruvi, ke la Esperanto-movado estas ne nur por la Okcidento, sed ankaŭ por Azio.

THE JOURNAL OF THE
ROYAL ANTHROPOLOGICAL INSTITUTE
OF GREAT BRITAIN AND IRELAND
VOLUME 40, PART 1, 1910

CONTENTS
The Journal of the Royal Anthropological Institute of Great Britain and Ireland, Volume 40, Part 1, 1910, contains the following papers:

- 1. The Journal of the Royal Anthropological Institute of Great Britain and Ireland, Volume 40, Part 1, 1910, contains the following papers:
- 2. The Journal of the Royal Anthropological Institute of Great Britain and Ireland, Volume 40, Part 1, 1910, contains the following papers:
- 3. The Journal of the Royal Anthropological Institute of Great Britain and Ireland, Volume 40, Part 1, 1910, contains the following papers:
- 4. The Journal of the Royal Anthropological Institute of Great Britain and Ireland, Volume 40, Part 1, 1910, contains the following papers:
- 5. The Journal of the Royal Anthropological Institute of Great Britain and Ireland, Volume 40, Part 1, 1910, contains the following papers:
- 6. The Journal of the Royal Anthropological Institute of Great Britain and Ireland, Volume 40, Part 1, 1910, contains the following papers:
- 7. The Journal of the Royal Anthropological Institute of Great Britain and Ireland, Volume 40, Part 1, 1910, contains the following papers:
- 8. The Journal of the Royal Anthropological Institute of Great Britain and Ireland, Volume 40, Part 1, 1910, contains the following papers:
- 9. The Journal of the Royal Anthropological Institute of Great Britain and Ireland, Volume 40, Part 1, 1910, contains the following papers:
- 10. The Journal of the Royal Anthropological Institute of Great Britain and Ireland, Volume 40, Part 1, 1910, contains the following papers:

THE JOURNAL OF THE
ROYAL ANTHROPOLOGICAL INSTITUTE
OF GREAT BRITAIN AND IRELAND
VOLUME 40, PART 1, 1910